
# MUŜO KAJ KULO

En la ĉambroangulo
sidas muŝo kaj kulo,
ambaŭ gaje, amike babilas.
"Ĉu vi sanas muŝeto?
- diras kul' kun koketo -
flugiletoj al vi ĉarme brilas"

Al la muŝo la flato
de la kul' diplomato
tre ekplaĉis. Ŝi milde ridetis
respondante: "Ha, dankon,
ne suferas mi mankon
de la sano", kaj poste ekpetis:

"Mia kara kuleto!
Tie estas la reto
de danĝera por ni araneo.
Do, akceptu konsilon:
tre evitu kaptilon!
Fali reton ja estas pereo".

Vane nigra kaj dika
araneo buŝpika
reton streĉis precize, inside.
Dume muŝo kaj kulo
en la ĉambroangulo
babiladas zumzume, plenfide.



La poemo aperis en "Fabela Mondo". Ni publikigas ĝin kun la permeso de Esperantina Mirska, filino de la aŭtorino, kiu mem pretigis la ilustraĵojn.